*nordfrancia esperanto-federacio*

# jarraporto 2004

Grava evento de la jaro estas la adopto, far la ĝenerala membrokunveno de la 18ª de aprilo 2004 kaj far la komitatkunsido de la 11ª de julio 2004, de nova statuto, nova interna regularo kaj aktualigita kontrakto kun UFE.

La bazaj karakterizoj de tiuj traktaĵoj estas :

*a)* difino de novaj geografiaj limoj kongruaj kun la administraciaj regionoj Nord-Pas-de-Calais-Picardie, sen la antaŭaj departementoj Marne kaj Ardennes ;

*b)* starigo de vera federacio kuniganta lokajn asociojn kaj individuajn membrojn ;

*c)* preciza difino de federacia revuo *Norda Gazeto* ;

*d)* preciza difino de daŭro de mandato de la komitatanoj kaj de limigita nombro de samaj mandatoj por la estraranoj ;

*e)* difino de etiko kaj celaro tute samaj kiel tiuj de Espéranto-France.

Dank' al la aligo de lokaj grupanoj, kaj dank' al grava varbkampanjo al la nefederacianoj de UFE (kun ĝia reciproko), la membraro kreskis de 101 membroj en 2003 al 132 en 2004. Sed samtempe kreskis la malekvilibro inter Nord-Pas-de-Calais (90 % de la membraro) kaj Pikardio (10 %). Granda strebo estu estonte farota al la tri departementoj Aisne, Oise kaj Somme ; kun interalie antaŭplanita tiea lokigo de federacia kongreso kaj de federacia ekzamensesio.

La federacia daŭrigas sian politikon al kursado kaj ekzamenado. Tutjaraj kursoj en lernejoj kaj universitato, prelegoj kaj someraj inicostaĝoj estas aparte viglaj en pluraj grupoj, kiuj kunigas pli ol cent kursanojn. En Arras, en julio, tuttaga dimanĉa ekzamensesio estis denove organizita, kun 6 kapableculoj ekzamenantaj 19 kandidatojn, el kiuj 2 por kapableco.

La grupoj de la federacio havas oftajn kontaktojn kaj renkontiĝojn kun la belgaj samideanoj de Courtrai, Solre-sur-Sambre, Charleroi, ktp. Ili akceptis plurajn alilandajn samideanojn, aparte de Finnlando, Litovio, Tanzanio kaj tiam organizis publikajn prelegojn. Ili partoprenis en neesperantistaj manifestacioj, stratparadoj, stratbazaroj kaj « forumoj de asocioj ». Pluraj federacianoj partoprenis Esperantajn staĝojn, kongresojn, manifestaciojn « ESF » kaj « Eŭropa Bunto ».

La federacio aperigas regule la revuon *Norda Gazeto* por ĉiuj siaj membroj kaj 4 grupajn revuetojn.

La jara kongreso estis en 2004, la 18ªⁿ de aprilo, akceptita en neforgesebla etoso de la belga esperantista grupo de Solre-sur-Sambre ; sed ĝi kunigis bedaŭrinde nur 60-on da partoprenantoj.

En novembro la tradicia internacia renkontiĝo de Morbecque venigis en 2003 centon da partoprenantoj, al kiuj ĝi proponis siajn kutimajn 4-nivelajn staĝojn kaj siajn elstarajn kulturajn prezentojn. Tio estas denove planita je la 6–7ªʲ de novembro 2004.

Venontjare la federacio daŭrigu sian politikon de malfermateco al la ekstero, de promocio de kursoj, staĝoj kaj ekzamenoj (kun speciala plialtigita budĝeto), de kunlaboro kun UFE aparte por rilati kun politikuloj kaj balotelektitoj.

Ĝi ĉefe daŭrigu sian aktivan preparadon de la « Internacia Amikeca Renkontiĝo de Boulogne 2005 » kun UFE kaj ties fakaj asocioj, SAT-Amikaro, FFEA kaj la belgaj kaj brita Esperanto-asocioj.

*Raportis : Claude Longue-Épée,*
*sekretario de la Nordfrancia Esperanto-Federacio*